V-25891/3(7) (1928)

JARO IIIa/VIIa. № 1 JANUARO 1928

ESPERANTO-LINGVA RESUM-FOLIO DE

# LA VOJO DE KLERIGO

MONATA PEDAGOGIA REVUO

ШЛЯХ ОСВІТИ
ПУТЬ ПРОСВЕЩЕНИЯ

Organo de la Ŝtata Scienca Metodologia Komitato ĉe la Popola Komisario por Klerigo de l'Ukraina Socialista Sovet-Respubliko

Redaktejo kaj Administrejo: K. Liebknecht-str., 31—Ĥarkov—Ukrainio—USSR

№ 1 (69) de „La Vojo de Klerigo" enhavas 63 artikolojn k(aj) notojn sur 240 paĝoj.

## ĜENERALAĴOJ

P. Ŝĉepanivski. La Ruĝa Armeo ĉe la kultur-fronto. La R. A. senkaŝe deklaras sin klasa batalforto de l'laborularo k tial larĝe disvolvas sian propagandan kaj klerigan agadon. Dum la periodoj de la plej akuta batalo multaj lernejoj estis funkciantaj en la R. A. k post la definitiva venko ĉi-lernejoj daŭras funkcii: pli ol 3000 r-a-noj ĉiumonate studas en ili, likvidante sian analfabetecon k plialtigante sian kulturnivelon ĝeneralan k politikan. Krome, eksterlerneja kultur-laboro estas farata en multegaj kluboj, Lenin-anguletoj, Domoj de l'R. A., rondetoj, kinejoj, teatroj, bibliotekoj ktp. La ruĝaj komandantoj (oficiroj) studas en specialaj kursoj. La instruado estas plejparte farata en la geparta lingvo de l'studantoj. Krom la interna kulturlaboro, la R.A. propagas sian kulturan influon je la loĝantaro, precipe en la kamparo: ĝi starigas diversajn aranĝojn por kulture helpi la loĝantaron k preparas la r-a-anoj por kultur-socia agado post ilia reveno hejmen. La R. A. estas ne nur milit-forto, sed anke granda lernejo porlaborulara. — Multaj statistikoj ilustras la artikolon.

J. Rjappo. Pri la sistemo de popola klerigado. La artikolo prezentas paroladon faritan de la aŭtoro ĉe kunveno de l'Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj de Blank-Rusio.— Dum la transira periodo al socialismo la kleriga sistemo ne povas esti komplete-socialisma. Ĝi devas konformi kun la bezonoj de l'nuna ekonomia k socia vivo, kun ties evolu-tendencoj; ĝi devas esti reale valora rekonstru-instrumento. Tia estas la ĝenerala principo. Sed en ties apliko al la konstruado de l'kleriga sistemo okazis disiĝo inter RSFSR k Ukrainio. La ĉefa disputpunkto estis lernejo por adoleskuloj. Konsiderante, ke la nuna industrio postulas fakulojn, oni konstruis en Ukrainio profesilernejon kun larĝa ĝeneralkultura enhavo post la elementa; sed ĉar la moderna industrio evoluas en la direkto al integriĝo de profesioj k malapero de l'labor-disfakiĝo en la futuro, oni decidis politeknikizadi ĉi-lernejon laŭgrade kun la evoluo ĉi-direkta de l'industrio. Sovet-Rusio iris aliun vojon: ĝi kreis ĝeneralkulturan lernejon duagradan evoluendan al politeknika; tiun vojon la ukrainianoj opinias erara, ĉar la bezonoj de l'nuna industrio restas tie sen atento. La aŭtoro plue konstatas, ke la rusia duagrada lernejo estis devigita—pro la postuloj de l'vivo—transformiĝi, proksimĝante al la ukrainia profesilernejo. Li aldonas, ke la ekonomiaj kondiĉoj mem de Sovetio ne permesas en la nuna periodo realigi ĝeneralkulturan politeknikan instruadon daŭrantan ĝis la 17-jara aĝo. Notinte plue aliun disiĝo-punkton—pri la rolo de l'teknikumoj, kiu estas neklara en RSFSR (pri ties rolo en Ukrainio—v. №№ 10 k 11/1926), la aŭtoro prezentas la ukrainian klerigan sistemon: antelerneja edukado por 4—7-jaruloj, elementa laborlernejo por 8—15-j., profesilernejo por 15—18-j. k fine—supera lernejo (teknikumo k instituto); kiel superstrukturo funkcias la scienc-esploraj institutoj kunigataj de la Akademio de l'Sciencoj. La malalta kultur-nivelo de la lando postulas ankore plurajn kromajn (ekstersistemajn) lernej-tipojn provizorajn; pri ili la aŭtoro parolas aparte. Li finas dirante, ke la granda socia intereso al la problemoj de popola klerigado atestas, ke kultura revolucio proksimas en Sovetio al sia maturiĝo.

O. Krakov. En la batalo por belliteraturo en la pliaĝaj grupoj de l'elementa lernejo. Laŭ la oficialaj programoj de l'soveta lernejo belliteraturo estas nur helpobjekto ĉe la sociscienca studoj. Sed lastatempe aŭdiĝas voĉoj por ties apartiĝo kiel memstara studobjekto; tian vidopunkton defendas la aŭtoro. Li montras, ke en la praktiko de l'lernejo oni studas nun literaturaĵojn pli profunde, samtempe interligante ilin kun la kompleksaj temoj, sed tio estas nesufiĉa: necesas forlasi la ilustran rolon de l'literaturaĵoj k studi ilin memstare kun literatur-teorio ktp.

Tio estas oficiale agnoskenda. (La artikolo estas publikigata kiel pordiskuta).

## METODOJ POR KLERIGA LABORO

T. Harbuz. Niaj metod-serĉadoj. La m.-s. de l'soveta lernejo plifortiĝis depost kiam la organizo-formoj k la materia bazo estis pli-malpli stabiliĝintaj. Ili celis: a) organizi la lernejan laboron, b) metode direkti ĝin, c) ellabori konforman instru-teknikon. La apartecoj de l'ukrainia soveta lernejo direktis ĉi-serĉadojn al maksimuma aktivigo de l'infanaro k al produktad-labora tendenco. Modifita (kolektivizita) Dalton-plano k ĉenera (grupopa) studado—unflanke k kompleksa instruado sur labor-bazo aliflanke—jen estas ties ĉefaj rezultoj. La nova koncepto pri l'pedagogia procedo kiel organizado de determinita konduto gvidis plue en la metod-teknikaj serĉadoj. Nun la teknik-alkonkiroj estas analizataj k klasigataj por esti adaptitaj al la kompleksa instruado. La instru-tekniko estas nun la plej aktuala problemo de l'soveta lernejo.

O. Buzinni. Pri literaturaj ekskursoj. La aŭtoro priskribas tian ekskurson faritan en Poltava k dediĉitan al la ukraina verkisto Kotlarivski (XIX[a] jc.) tie vivinta. Multaj k diversaj memorrestaĵoj pri la verkisto mem k pri lia epoko permesis bone pristudi la biografion k donis valoran materialon por la enklasaj studoj. Similaj ekskursoj diverskarakteraj estas rekomendindaj.

Henny Schumacher. Metodoj por antelernaja edukado en Germanio. En sia dua artikolo (la unan—v. № 12/1927) la aŭtoro atentigas pri gravaj ŝanĝoj okazintaj dum la lastaj 20 jaroj en ĉi-tiu regiono. Kiel la plej gravaj progresoj estas notendaj: edukado per kolektivo, per interhelpo, per ago (anstat parolo), fido al la infana naturo, akcelado de l'spontana aktiveco, intima ligitesto kun la naturo, produktiva laboro, sent-edukado per liberaj ludoj ktp. La aŭtoro konkludas, ke nur tiu edukado estas valora, kiu estas bazita sur fido al la pozitivaj potencoj de l'formiĝanta individuo.— Redakta noto atentigas, ke la ĝenerala pozicio de l't. n. „libera edukado" estas intelektul-individuista formulo, kvankam revoluciiga sub kapitalisma reĝimo, tamen nesufiĉa por konstruado de nova laborula mondo, kiu postulas certan klase-determinitan organizon de l'homa konduto. Sed enesto de kelkaj pozitivaj elementoj (edukado per kolektivo, per laboro, en natura k produktada medio k s.) esperigas, ke—ĉe la venonta soci-revolucia transformiĝo en Germanio—tiu idearo evoluos al klara konsekvema proleteca edukad-sistemo.

## KLERIGA PRAKTIKO

L. R. Kohan. Arta rakontado k la leganto. La aŭtoro esploris la influon de belarta rakontado je l'aŭskultantoj k je iliaj legant-interesoj. Rakontinte al kunvenintaj 622 bibliotek-vizitantoj en Odessa la verketon de Jack London „Meksikano", li plue enketis la aŭskultintojn (demandaro facila, mallonga, kun presitaj respondoj substrekendaj laŭplaĉe) k statistike prilaboris la rezultojn. La ĉi-lastajn li prezentas en 13 tabeloj. Kvankam la impresoj de la tuto k de diversaj partoj tre varias depende de l'socia pozicio, sekso k aĝo de l'aŭskultinto, estas konstatebla ĝenerale tre granda influo de belarta rakontado tiel pro sia impresivo, kiel anke laŭ la vekata intereso al legado. Tiu stimulilo estas larĝe utiligenda en la laboro de mas-bibliotekoj.

Paŭlo Volobujev. Instruisto kiel organizanto de l'infana labor-kolektivo. La nova pedagogio, celante solvi la tre aktualan problemon pri organizo de l'infana laboro en la klaso, serĉas ties faktorojn. La ĉi-lastaj estas divideblaj je 3 kategorioj: la situo, la instru-procedo, la infan-kolektivo. La labor-konduto de l'infanoj k la produktiveco de l'lerneja laboro dependas de la organizo de ĉiuj-ĉi faktoroj. Sur tiaj principoj la aŭtoro konstruis specialan skemon, kies eksperimenta apliko pruvis ĝian praktikan valoron por racie organizi la instru-laboron.

Prof. N. N. Tarasevic̑. Helplernejoj en la Okcidento k ĉe ni. La spertoj de l'Okcidento (Germanio, Francio k a. l.) pruvis la absolutan neceson havi por subnormaj infanoj nacian (kontrolatan de la ŝtato) sistemon da apartaj helplernejoj kun speciala kurac-edukado k instruado (ĉefe profesia). En Sovetio la revolucio permesis fundamente reorganizi ĉi-aferon k starigi la plej progreseman sistemon. La spertoj pruvis, ke memstaraj helplernejoj estas necesaj, ne helpklasoj. La celo estas: 1[e] — per kurac-edukado korekti la mankojn de l'infanoj; 2[e] — prepari por produktiva labora k socia vivo. La programoj k metodoj konformiĝas kun ĉi-celo. La aŭtoro detale priparolas ĉion-ĉi, citas

multajn faktojn k verkojn, montras konkretajn ekzemplojn, priskribas tipan sistemon (Mannheim). Plue li montras, ke la soveta sistemo laŭ sia organizo proksimas al la plej avangardaj el tiuj okcidentaj k evoluas en la direkto al plia diferiĝo de l'helplernejoj. Fine li akcentas, ke sana ordinara lernejo realigonta universalan instruadon estas neebla sen selektado k disklasigo de l'lernantoj k apartigo de la subnormuloj. Por fari tion, solaj testoj pri inteligento ne sufiĉas; necesas anke zorga esploro k komparo kun la fizika stato. Ĉio-ĉi estas farenda skrupuloze k laŭgrade, k ĉie estas unavice aranĝendaj apartaj helplernejoj.

## VIVO DE KLERIGO

D-ro E. Katkov. Vladimir Mihajloviĉ Beĥterev. 24.XII.1927 mortis en Moskvo tiu ĉi tutmonde konata rusa sciencisto, kreinto de l'refleksologio (objektiva scienco pri l'konduto de l'superaj animaloj k de la homo). La aŭtoro koncize priskribas la vivon k verkon de l'mortinta akademiano k taksas ĉi-morton kiel grandegan perdon por la tutmonda scienco, aparte por la soveta socio k scienco.

S. Kilkoliĥ. Sumigoj pri la V[a] tutukrainia konfero pri l'komunista infan-movado. Ĉi-konfero, okazinta en Ĥarkov komence de januaro, priparolis plurajn gravajn problemojn de l'i.-m. La nuna situo postulas ordigi la enhavon de l'junpionira laboro, en kiu la socia agado devas esti la bazo. Akirado de certaj scioj k kutimoj—laboraj, kulturaj, higienecaj k a.—devas altiri la atenton Aktiveco de l'infanoj estas maksimume stimulenda k akcelenda. Bonan prizorgon postulas science-teknikaj rondetoj k politika informado de l'junpionroj En la vilaĝoj la junpionira taĉmento devas pliprofundigi sian soci-kulturan rolon k altiri la lokajn kulturajn fortojn al kunlaboro. Fine estis priparolitaj specialaj raportoj pri eksterlerneja laboro kun infanoj, pri ukrainizo, pri laboro ĉe naciaj minoritoj k pri pliperfektigado de l'pionirgvidantoj.

I. Rohozni. Kulturkleriga laboro inter la ukraina loĝantaro de l'RSFSR. En Sovet-Rusio loĝas multaj ukrainoj. kelkie tre kompakte, sed ĝis nun plejparte il a instruado ne okazas en ilia nacia lingvo. Tial la rusia Narkompros ordons al la lokaj klerigorganoj korekti siajn labor-planojn por forigi ĉi-mankojn. Estas projektata: en ĉiuj klerigejoj instrui en la gepatra lingvo; provizi per ukraina literaturo la lokajn legej-dometojn; eldoni lokajn ukr. gazetojn; prizorgi kompetentajn ukr. instruistojn por la koncernaj regionoj; eldoni lernolibrojn ukr -lingvajn por ĉiregionoj.—Statistikoj estas aldonitaj.

A. M. Mandrika. Kvara internacia konfero pri psikotekniko. La aŭtoro, delegito de Ukrainio ĉe ĉikonfero okazinta en Parizo 10—14.X.1927, detale raportas pri ĝi. Partoprenis ĉ. 200 personoj el 22 landoj. Estis priparolitaj psikologiaj k matematikaj metod-problemoj, konstruado k mezurnormigo (étalonage) de la testoj, raciigo de l'laboro k mens-higieno. Analizante la laboron de l'konfero, la aŭtoro konstatas ties valoron por la edukado.

Almodovar del Valle. La vilaĝa lernejo en Hispanio. Nia kunlaboranto el Barcelona reliefe pentras la teruran staton de l'hispania vilaĝa lernejo. Malgre oficiale ekzistanta leĝo pri universala instruado obliga, la nombro da lernejoj estas treege nesufiĉa k ties frekventado ekstreme malbona. La instruado — laŭ sia enhavo k metodoj — estas skolasta, penetrita de religieco k kontrolata de la pastraro; ĉio progresema estas persekutata. La ekonomia situo de l'lernejo k de la instruisto estas mizera; la lasta, timante malfavoron de l'malklera loĝantaro k de la estraro, nenion faras por progresigi sin mem k la instruadon. La aŭtoro konkludas: la nuna lernejstrukturo estas detruenda k 99% el la instruistaro elpelendaj.

## PEDOLOGIO

J. Zilberfarb. La una pedologia kongreso. Tiu-ĉi tutsovetia kongreso okazis en Moskvo 28.XII.1927—4.X.1928. Partoprenis pli ol 2000 personoj. El ĉ. 340 proponitaj raportoj preske 60% estis prelegitaj k priparolitaj ĉe plenkunvenoj k en 7 sekcioj; abunda materialo ilustranta la progresojn de l'soveta pedologio estis prezentita en la kongresa ekspozejo Ĉiuj skoloj k tendencoj de l'sovetia pedologio partoprenis k post diskutoj—daŭraj k kelkiam tre akutaj—pri la plej gravaj problemoj (esenco de l'pedologio, ĝiaj interrilatoj kun la pedagogio, tuteca aŭ poparta esploro de l'infano, dialektiko, indukto k dedukto en la pedologia studesploro, psikologia aŭ refleksologia vidopunkto pri la homa konduto, valoro de diversaj esplormetodoj, biologia k socia faktoro en la

infan-evoluo, la problemo „individuo-socio“ k m. a.) oni venis al interkonsento pri la aktualaj taskoj: 1e — rekonstrui la pedologion sur science-materialisma marxisma fundamento, 2e — intime interligi ĝin kun la soveta edukada teorio k praktiko, 3e — laŭplane organizi la pedologian laboron sur tutsovetia skalo. La ĝenerala optimisma pozicio de l'soveta pedologio celanta socialisman rekonstruon de la homo (v. art. de Lozinski k Zalkind en №№ 5 k 6-7/1927) estis unanime aprobita. La principe-metodologia, organiza k socia valoro de l'kongreso estas ekstreme granda k ĝia signifo vere historia.

A. M. Furmanov. La idear-cirklo de laboristaj adoleskuloj. La aŭtoro eslporis laŭ la demandar-metodo 134 adoleskulojn 15—17-jaraj el Domo de Laborista Junularo (intern-edukejo) en Ĥarkov. Ekspozinte la celon k metodon de l'eslporo, karakterizinte la objekton k la kondiĉojn, prezentinte la enhavon de l'demandaro, la principojn de l'disklasigo de la respondoj k la analizoteknikon, la aŭtoro donas en kelkaj ĉapitroj detalan analizon de l'rezultoj — ĝeneralan k diferigitan (depende de la sekso, de l'lernado-progresoj, de naciaesto, de orfesto, de l'lerno-daŭro, de l'medio); 12 statistikaj tabeloj k 3 grafikoj ilustras ĉi-analizon. El la multaj konkludoj ni notu, ke la demandoj pri aferoj simplaj k kutimaj donis grandan °/₀ da ĝustaj, sed malgrandan—da ĝustaj-precizaj respondoj; la demandoj postulantaj pli malpli altan ‚penskapablon rezultigis minimumon da respondoj ĝustaj-precizaj k ĝustaj; la plej trafajn respondojn donis: edukitoj de infan-domoj, orfoj, studo-progresintoj, adoleskuloj kun 4—6-jara lerno-daŭro, judaj knabinoj k ukrainaj knaboj. (Daŭrigota).

Iv. Kozlov. Provo kompare studesplori laŭnorman k subnorman infanon. La esploro, pri kiu la artikolo raportas, celis malkovri la influon de l'fizika stato je la inteligent-nivelo. Estis esploritaj en Leningrad 491 subnormuloj (debilaj, imbecilaj k idiotaj) rilate al ilia fiziostatiko k fiziodinamiko. Detala analizo de l'rezultoj k komparo kun la normoj (standardoj) kondukas la aŭtoron al konkludo, ke postrestado en la mensa evoluo procedas paralele k samgrade kun tiu en la sfero fizika (staturo, pezo, interna sekrecio); en la du rilatoj la evoluo estas neregula, nelaŭgrada, senorda, „mozaikeca“. Ĉi-konkludo havas grandan valoron ne nur teorian, sed anke praktikan.— Du statistikaj tabeloj estas aldonitaj.

## KRONIKO

Tra Sovet-Ukrainio: Priservo de l'kultur-interesoj de la tuta ukraina popolo. Pliperfektigado de l'sociedukistoj. Kino-instaloj en lernejo. Judlingva porpionira gazeto. Konfero de germanlingvaj klerig-inspektistoj. Pensia asekuro por instruistoj. Pri vilaĝaj instruistoj-anterekrutuloj. Labor-raciigo en vesperaj laboristaj teknikumoj. Ekstern-ekzamenoj al instruistoj. Pri ti-kiuj finis malnovajn instruist-institutojn. Instruado pri infanmovado en pedagogiaj superlernejoj. Judlingva pedagogia revuo. Rezultoj de l'akcepto al laboristaj fakultatoj, teknikumoj k institutoj por 1927—28. Agado de l'Tutukrainia Komitato por Helpo al Scienculoj. Komisiitaro pri sciencaj studvojaĝoj eksterlanden. Honorigo al la memoro de Beĥterev. Solenado de l'Tolstoj-jubileo. Vortaroj-eldono. Esploro de lernolibroj por unagradaj analfabeteclikvidaj lernejoj. Tutsovetia kongreso de judaj kleriglaboristoj. Konfero de instruistoj de l'ukraina lingvo k literaturo.

Tra Sovet-Unio: Tutsovetia kongreso de region-esploristoj. Konfero pri raciigo de bibliotek laboro. Tutrusia konfero de naturscienscaj instruistoj. Asocio de laboristoj de l'pedagogia gazetaro. Dekjaro de l'revuo „Naturscienco en Lernejo“.

Eksterlande: Internacia konfero pri bilingvismo.—Britio. La Labor-Partio k edukado. Sano de l'brita lernanto. Al la kreo de unika instruista sindikato.—Belgio. Kongreso de l'socialista instruistaro.—Germanio. Protekto al la sano de lernantoj en Leipzig.—Hungario. La „numerus clausus“ en lernejo.—Portugalio. Persekutoj kontr la instruistaro.—Usono. Kongreso de l'Amerika Instruista Federaĵo.—Nov-Zelando. Instruistaj salajroj.

## BIBLIOGRAFIO

La rubriko enhavas grandan revuon de l'porinfana literaturo el Okcidenta Ukrainio (ĉ. 50 titoloj), 7 recenzojn pri novaj libroj rus- k ukrainlingvaj (socia edukado de infanoj — 2, lernolibroj — 2, diversaĵoj—3) k kronikon de l'edukada literaturo (estas enregistritaj 68 sovetaj eldonaĵoj aperintaj dum januaro: 30 ukrain-, 34 rus- k 4 alilingvaj).

Перша друкарня Державного Видавництва України ім. Г. І. Петровського

Укрголовліт № 484/кв. 9. 1927. Зам. № 1272. Тираж 1.700.